

Hermann Allmers,
Kampa soleco

tradukita de Manfred Retzlaff

Ripozas mi en alta verda gres'
Kaj sendas longan vidon al-etere,
La griloj ĉirpas ĉirkau mi sen ĉes',
Ĉirkaŭas min ĉiela blu' mistere.

Kaj belaj, blankaj nuboj iras jen
En la bluego kiel sonĝoj belaj;
Mi kvazaŭ jam mortinte ŝvebas en
Eternaj kaj trankvilaj spacoj helaj.

*Traduko de la Germana poemo "Feldeinsamkeit" de HERMANN ALLMERS (*1840-02-01 - †1902-03-09) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04).*

Arg-650-1309 (2012-12-18 22:34:38)

Pri la poeto vidu la retejojn http://www.hermann-allmers.de/wer_ist_hermann_allmers.php kaj http://de.wikipedia.org/wiki/Hermann_Allmers.

Hermann Allmers,
Feldeinsamkeit

Ich ruhe still im hohen, grünen Gras
und sende lange meinen Blick nach oben,
von Grillen rings umschwirrt ohn' Unterlass,
von Himmelsbläue wundersam umwoben.

Und schöne weiße Wolken ziehn dahin
durchs tiefe Blau, wie schöne stille Träume; -
mir ist, als ob ich längst gestorben bin,
und ziehe selig mit durch ewge Räume.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HERMANN ALLMERS (*1840-02-01 - †1902-03-09).*

Arg-650-1307 (2012-11-05 21:55:48)

*Siehe: http://gedichte.xbib.de/Allmers_gedicht_Feldeinsamkeit.htm. Audu an-
kau: <http://www.youtube.com/watch?v=Xghye5EhhvA>.*